33-A DIMANĈO DE LA ORDINARA TEMPO – 13an de novembro 2011

VI ESTIS FIDELA PRI MALGRAVAJ AFEROJ, VENU PARTOPRENI EN LA ĜOJO DE VIA SINJORO! - Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Mt 25, 14-30

En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj ĉi tiun parabolon: «Iu viro forvojaĝante, vokis siajn servistojn kaj komisiis al ili siajn posedaĵojn. Al unu li donis kvin talentojn, al alia du, al la tria unu kaj forvojaĝis. Kaj tiu, kiu ricevis la kvin talentojn, iris kaj negocadis per ili, kaj gajnis pluajn kvin talentojn. Ankaŭ tiu, kiu ricevis du, gajnis pluajn du. Sed tiu, kiu ricevis unu talenton, fosis truon en la tero kaj kaŝis la monon de sia sinjoro.

Post longa tempo la sinjoro revenis, kaj petis de la servistoj la kontojn. Venis unua tiu, kiu ricevis la kvin, kaj li alportis pluajn kvin, dirante: "Sinjoro, Vi konfidis al mi kvin talentojn: jen mi gajnis aliajn kvin". Lia sinjoro diris al li: "Bone; vi estas lerta kaj fidela servisto. Vi estis fidela pri malgravaj aferoj; mi transdonos al vi pli gravajn. Venu partopreni en la ĝojo de via sinjoro". Venis poste ankaŭ tiu, kiu ricevis du talentojn, kaj diris: "Sinjoro, vi konfidis al mi du talentojn: jen mi gajnis pluajn du". Kaj la sinjoro diris al li: "Bone; vi estis lerta kaj fidela servisto. Vi estis lerta pri malgravaj aferoj; mi komisios al vi pli gravajn. Venu partopreni en la ĝojo de via sinjoro".

Venis fine ankaŭ tiu, kiu ricevis unu talenton, kaj diris: "Sinjoro, mi sciis, ke vi estas postulema homo; vi rikoltas eĉ kie vi ne semis, kaj kolektas fruktojn kie vi ne kultivis. Mi timis; kaj pro tio mi kaŝis viajn monerojn sub la tero. Jen, mi redonas ilin al vi". Sed la Sinjoro respondis al li: "Malbona kaj mallaborema servisto: vi sciis do ke mi rikoltas kie mi ne semis, kaj ke mi kolektas, kie mi ne laboris. Pro tio vi estus devinta almenaŭ doni mian monon al bankistoj; kaj reveninte mi estus ricevinta mian propraĵon kun

procento. Do forprenu de li ĉi tiun talenton, kaj donu ĝin al tiu, kiu jam havas dek. Ĉar, al tiu, kiu havas, estos aldonate, kaj li havos abunde. Sed de tiu, kiu havas malmulte, estos forprenata eĉ tio, kion li havas. Kaj ĉi tiun mallaboreman serviston forĵetu eksteren, en mallumon; tie estos plorado kaj grincado de dentoj”».

Misa, erara bildo pri Dio povas damaĝi porĉiame la vivon de kredanto. Pro tio estas bone koni la veran vizaĝon de Dio, kiel Jesuo ĝin diskonigis. Estas tio kion esprimas Mateo en la ĉapitro 25 de sia evangelio, en la versikloj 14-30.

Diras Jesuo: «Iu viro forvojaĝante, vokis siajn servistojn kaj komisiis al ili siajn posedaĵojn». Tiuepoke ĉiuj dungitoj de iu reĝo, de iu gravulo, estis vokataj servistoj, sed en tiu ĉi kazo temas pri altrangaj funkciuloj. Fakte al tiuj estas konfidita rimarkinda posedaĵo. Gravas la verbo utiligata de la evangeliisto. La verbo “komisii” signifas doni sen repreni, ne temas do pri gardado, sed pri transigo de propraj posedaĵoj al liaj funkciuloj.

“*Al unu li donis kvin talentojn*” talento estis ora mezurunuo kiu oscilis, laŭ la tempoj, inter 26 kaj 36 kilogramoj da oro, do grandega sumo. Unu talento egalis al 6000 denaroj, kiuj egalis al ĉirkaŭ dudek jaroj de laborista salajro, do rimarkinda sumo., “*Al alia du, al la tria unu laŭ la kapabloj*”, laŭvorte “la forto”, tio estas tio kion ili kapablis antaŭenporti, “…*kaj forvojaĝis*.”

Nu, Jesuo diras ke: “*Tiu, kiu ricevis la kvin talentojn, iris kaj negocadis per ili, kaj gajnis pluajn kvin talentojn. Ankaŭ tiu, kiu ricevis du, gajnis pluajn du*”. Male la tria strange kondutas. “*Tiu, kiu ricevis unu talenton*” kio ne estas malmulte, temas ĉiam pri tridek kilogramoj da oro, do grava sumo, “*fosis truon en la tero kaj kaŝis la monon de sia sinjoro”.*

Kial tio? Ĉar li restis servisto. Dum la aliaj per tiu cifero sentas sin jam sinjoroj kaj mastroj de propraj posedaĵoj, por li la talento estas la mono de lia mastro, li restis servisto. Sed kial li iras ĝin kaŝi entere? Ĉar, laŭ la rabena juro, kiam oni terenkaŝis trezoron aŭ monon, en kazo de ŝtelo oni ne estis devigataj ĝin repagi.

En tiu kazo tiu servisto ne kredas je la malavareco de la mastro kaj ne kredas eĉ en si mem kiel ricevinto de la donaco. Nu, “*Post longa tempo la*

sinjoro revenis, kaj petis de la servistoj la kontojn" tio ne signifas por rehavi, sed por koni ilian agadon. «*Venis unua tiu, kiu ricevis la kvin, kaj li alportis pluajn kvin, dirante: "Sinjoro, Vi konfidis al mi kvin talentojn: jen mi gajnis aliajn kvin". Lia sinjoro diris al li: "Bone"*, per la samaj vortoj per kiuj la Dio de la kreado, la kreinto admiras sian verkon.

Do la mastro, kiu reprezentas Dion, estas kontenta pri tiu persono kiu, ricevinte lian donacon, komplete ĝin elprofitigis. Li vokas: *"lerta kaj fidela servisto. Vi estis fidela pri malgravaj aferoj…"*, diri ke iu fidelis pri malgravaj aferoj kiam temis pri 150 kilogramoj da oro… "*mi transdonos al vi pli gravajn*", tio estas laŭvorte "mi igos vin stabila per granda donaco"."*Venu partopreni en la ĝojo de via sinjoro*." Tiu sinjoro montras sin tre malavara. Ne nur li ne petas returne la monon, la talentojn kiujn li donis: ne nur li ne postulas interezojn, sed eĉ tiun funkciulon, tiun serviston li invitas partopreni en ĉiuj siaj posedaĵoj, li al tiu konfidas sian tutan administradon.

Tiu ne plu estas servisto, sed sinjoro kiel li. Same por tiu kiu ricevis du talentojn. Male, kiam prezentiĝas tiu kiu ricevis unu nuran talenton, kiu al li diras: "*Sinjoro mi sciis ke vi estas postulema homo*" do tio estas io kion li scias, sed li havas torditan bildon kiu ne respondas al tio kion ni vidis. Ĉi tie estas sinjoro ekstreme malavara kiu, ne nur ne petas returne siajn havaĵojn, ne plu traktas ilin kiel servistojn, sed kiel mastrojn.

Male tiu diras: "*Sinjoro, mi sciis, ke vi estas postulema homo; vi rikoltas eĉ kie vi ne semis, kaj kolektas fruktojn kie vi ne kultivis. Mi timis…*" jen la baza temo de tiu parabolo, ĝi estas la timo je Dio. La timo je Dio, kiu malpermesas al la personoj – pro timo riski aŭ peki – sin realigi. "…*mi kaŝis viajn monerojn sub la tero*." Tio gravas, "viajn" monerojn. La sinjoro ilin donis al li, fakte la aliaj diris "tio kion mi havas". Male li neniam sin konsideris mastro de tiuj moneroj. Fakte li diras "viaj moneroj", kaj tion li rediras "*Jen, mi redonas ilin al vi."*

Li neniam ilin konsideris siaj. La respondo de la sinjoro estas tre severa. "*Malbona kaj mallaborema servisto*" kaj li preterlasas sin difini "postulema homo", kiel la servisto lin difinis. "*Malbona kaj mallaborema servisto, vi sciis do ke mi rikoltas kie mi ne semis, kaj ke mi kolektas, kie mi ne laboris*", la eldiro de la sinjoro estas demandosigna, li ne estas tia. "Estas vi kiu pensas ke mi estas tia, estas vi kiu havas tiun eraran bildon pri mi", pro tio demandosigna.

La timo erari en tiu homo paralizis lian kreskon kaj la sinjoro lin riproĉas dirante: "*Vi estus devinta almenaŭ doni mian monon al bankistoj; kaj reveninte mi estus ricevinta mian propraĵon kun procento. Do forprenu de li ĉi tiun talenton…*", kial oni forprenas la talenton? Kaj kial, male, lasi al li tion kio por li estas nur kialo de angoro, maltrankviliĝo, timo?

"… *kaj donu ĝin al tiu, kiu jam havas dek"*. Kaj jen ĉi tie la tre grava sentenco de Jesuo, kiun ni jam aŭskultis en la parabolo de la kvar grundopecoj, "*Ĉar, al tiu, kiu havas, estos aldonate, kaj li havos abunde. Sed de tiu, kiu havas malmulte, estos forprenata eĉ tio, kion li havas".* La verbo havi estas rezulta verbo, kiu ĉiam estas rezulto de io. Ĉi tie temas pri produktado. Al tiu kiu produktas amon, oni donas des pli grandan amkapablon; sed kiu produktas tre malrapide, oni steriligas tion kion li havas kaj li troviĝas en situacio havi nenion.

Ne temas do pri maljustaĵo flanke de la Sinjoro, sed temas pri vivdinamiko. Al tiuj kiuj fruktigas la donacojn estas donata plia granda kapablo ilin fruktigi; ju pli oni amas kaj des pli oni estas kapabligitaj de la Sinjoro ami.

Kaj jen la terura, tre severa konkludo, "*Kaj la mallaborema servisto*…", vokata iĝi sinjoro, li restis servisto. Jesuo volas transirigi siajn disĉiplojn de iu kondiĉo de servistoj de Dio, kiun Moseo trudis al ili – la interligo de Moseo estas interligo inter servistoj kaj ilia sinjoro – al filoj de Dio, sinjoroj kiel li.

Sed Jesuo konscias pri la malfacileco pasi de tiu kondiĉo de obeo al tiu de libereco de la filoj de Dio. Ne ĉiuj sukcesas je tio, ĉar la libereco havas neniun certecon escepte de tiu de la interna forto. La mallaborema servisto do, vokata esti sinjoro, sed restinta servisto, "*forĵetu eksteren, en mallumo*", kial en la mallumo? Li, pro la fakto ke li terenkaŝis sian talenton, jam enterigis sin mem, li jam estis mortinta, li ne vivis. "*Tie estos plorado kaj grincado de dentoj"*, esprimo per kiu en la Biblio oni indikas la fiaskon de iu ekzisto. Kaj tiu persono fiaskis pri sia ekzisto pro timo je Dio.

Estas la religio kiu encerbigas la timon je Dio por regi la personojn. Sed Jesuo venas ilin liberigi je tio. En la unua letero de Johano estas la tre bela esprimo "*en la amo ne estas timo kaj tiu kiu timas ne estas perfekta en la amo".*

Do ne la timo je Dio devas reguligi la sintenon de kredanto, sed la amo. La amo liberigas kaj estas liberiganto de la personoj.